


# Israelo : Viktimoj de Kovid-vakcino sin aŭdigas

**Nun kiam la germana Registaro decidis fari vakcinadon deviga por flegistoj, la urĝa demando por multaj homoj estas : Ĉu mi devas vakciniĝi? Antaŭ ol vi decidos pri tio, ni rekomendas, ke vi spektu ĉi tiun filmon faritan en Israelo kaj aŭskultu, kion la vakcinitaj homoj diras pri ĝi.**

La amaskomunikiloj ĉiam prezentas Israelon kiel pioniron en la batalo kontraŭ pandemioj. La lando vakcinis pli rapide kaj pli frue ol ĉiuj aliaj. Jam de februaro 2021, la cifereca "verda pasporto" estis lanĉita. Tial, multaj areoj de la publika vivo ne plu alireblos por Israelanoj sen pruvo de vakcinado aŭ resaniĝo. Multaj homoj vakciniĝis, por povi denove iri al teatro aŭ kinejo. Multaj bezonis vakciniĝi por povi labori. Multaj homoj ne eltenis la publikan premadon ĉar la socio konsideras ilin kiel teroristojn kaj incitas malamon kontraŭ ili. La politikistoj kaj la komunikiloj prezentas tiun ŝtatan agon kiel sukceson en la batalo kontraŭ la Kovid-krizo.

La sociaj retoj tamen donas alian bildon de tiu vakcina kampanjo. Miloj da homoj raportas tre severajn vakcinajn kromefikojn, eĉ morton. Oni aŭdas nenion pri tio publike. En Israelo, ne ekzistas oficiala vakcin-rilata raporto-centro al kiu viktimoj povas sin turni. La ŝtato forlasas ilin.

Tio alarmis Avital Livny, ĉar ankaŭ ŝi kaj ŝiaj du infanoj devas esti vakcinitaj. Ŝi komencis serĉi homojn kun vakcina damaĝo kaj ŝi publikigis ilian suferon. Ŝi trovis 40 kuraĝulojn pretajn montri siajn vizaĝojn kaj rakonti kion ili spertis post vakcinado.Tio rezultigis profunde kortuŝan unuhoran filmon titolitan "The Testimony Project". En tiu filmo, nun evidentiĝas al ĉiuj, kiajn dramajn efikojn la vakcinadoj jam havis. En la retejo, kiu aperas sur la ekrano [https://www.vaxtestmonies.org/fr/] S-ino Livny kolektas pli da atestoj kaj diras :
"Per nia projekto, ni volas provizi platformon al ĉiuj, kiuj suferis damaĝon pro la vakcinado Kovid-19.

Ni volas, ke iliaj voĉoj estu aŭdataj. Niaj ĉefaj komunikiloj ne aŭdigos ilin. Ni volas instigi vin rakonti viajn spertojn- Vi ne estas solaj !"

**de lnc. rw.**

**Fontoj:**

Filmo "The Testimony Project". https://www.vaxtestimonies.org/fr/
Israel als Vorreiter der Pandemiebekämpfung
https://www.welt.de/politik/ausland/plus233992872/Israel-Der-Fluch-das-Labor-der-Welt-zu-sein.html
Avital Livny im Coronaausschuß https://www.bitchute.com/video/irT3EhzH3f8m

**Ankaŭ tio povus interesi vin:**

#Kronaviruso - www.kla.tv/Kronaviruso

#Vakcinado - www.kla.tv/Vakcinado

#Israelo - www.kla.tv/Israelo

**Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...**

- Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

**Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie:** **www.kla.tv/abo-en**

**Sekureca Avizo:**

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la interesoj kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

**Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie:** **www.kla.tv/vernetzung&lang=eo**

*Licenco:* *Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.